

NORDFRANCA

ESPERANTISTO

(PIKARDA STELO - NORDA GAZETO - ANTAŬEN)



MONATA REVUO

de la Nordfrancaj Esperantistoj

Publikigas la sciigojn de la Norda Federacio
kaj de la Grupoj

REVUE MENSUELLE

des Espérantistes du Nord de la France

Publie les renseignements
de la Fédération du Nord et des Groupes



Redaktejo kaj administrejo:

18, rue Albert I^{er} - DUNKERQUE (Nord)

C. VERNAY, Direktoro-Prisrespondanto

G. VANHOVE, Administranto

Redakta Komitato, redaktas

Jarabono: Francujo 10 frankoj

altaj landoj: 8 respondkuponoj aŭ egalvaloro

POŝTĈEKKONTO: LILLE 403-50

C. VERNAY, DUNKERQUE

Les bonnes adresses de Dunkerque...

KODAKS
PHOTO-AMATEURS

CAYEZ

9^{bis}, Rue Clémenceau - DUNKERQUE

Travaux - Agrandissements
Stoeks de toutes marques
Esperanto parolata

ATELIER DE RELIURE ET CARTONNAGE
(Fondé en 1860)

Louis BLOT

10, Rue Dupouy, DUNKERQUE

Reliure en tous genres
de luxe et d'amateur
Esperanto parolata

IMPRIMÉS EN TOUS GENRES - PAPETERIE

RELIURE - GRAVURE

Fournitures classiques et de bureau

Librairie du Beffroi

Albums et Timbres pour Collectionneurs
Livres - Insignes Espérantistes

MOREAU-FOURMEUX

28, Rue Clémenceau, DUNKERQUE

"Au Roi du Saucisson"

Roger BRATS

30, Rue Michelet

COUDEKERQUE-BRANCHE

Fromages, Conserves, Confitures

Vente sur tous les Marchés de la Région

Fabrique de Casquettes

BÉRETS - CHAPEAUX

EDMOND

Chapelier

38, Rue Poincaré - DUNKERQUE

"Les BLEUETS"

26, Rue Poincaré - DUNKERQUE

Blanche RAMOUT

Fleuriste

Vous y fournir, c'est affirmer votre bon goût
Choix de Plantes - Cerbeilles
Gerbes et Bouquets

**Les Coopérateurs
de Flandre et d'Artois**

3, route de Bergues - Coudekerque-Branche

La Coopération est le moyen idéal de
répartition des produits de consommation
*Adhérez tous à la Coopération pour défendre
vos intérêts*

Depuis sa fondation, notre Société a payé
à ses adhérents plus de 40 millions francs
de ristournes et d'allocations (naissances,
maladies, décès).

*La Coopération est un Syndicat
de Consommateurs*

LES COOPÉRATEURS vendent à tous :
actionnaires ou non

Nos magasins sont ravitaillés chaque matin
en PAIN d'excellente qualité (vendu 0 fr. 10
au-dessous de la taxe officielle).
en LAIT FRAIS PASTEURISÉ.

Tout l'HABILLEMENT

Hommes, Jeunes Gens
Enfants

AU BON VÊTEMENT

Maison O. ROZEN

17, Rue des Chaudronniers

DUNKERQUE

Esperanto parolata

BIJOUTERIE

Georges MAEGHT

9, Rue Clémenceau, DUNKERQUE

Choix énorme de Bagues de fiançailles
Alliances et Cadeaux de mariages

Rabato al niaj Samideanoj

NORDFRANCA ESPERANTISTO

Monata Revuo de la Nordfrancaj Esperantistoj

2 a Serio - 15 a Jaro

Noj 7-8

MAJO-JUNIO 1938

PREPARU VALIZON !...

La 19a Nordfranca Federacia Esperanto-Kongreso
okazos en LENS la 7an kaj 8an de Majo 1938 !

Internacia Libertempa Semajno

ĉe la maro en MALO-LES-BAINS 2a-10a de Julio 1938



S-ro PERSSON (el Svedlando)

kiu gvidos dum tiu semajno la 7an someran kurson de S.F.P.E. (Per-
fektigo per konversacio). Petu informojn kaj senpagan gvidlibron de :
"Esperanto-Dunkerque".

P O R V I

Kiam manon vian en mia mano
 Mi tenis
 Kaj premis,
 Cio al mi surtere ŝajnis vano !
 Kiom tiujn nigrajn okulojn brilajn
 Mi amis
 Kaj ravis
 Min ili ! Aer', ĉiel' estis helaj !
 Vivantaj, ruĝaj fruktoj : viajn lipojn
 Mi kisis ;
 Sed mokis
 Min vi. Oh ! jes, mi preferus batvipojn !
 Kara estaĵo ! Plenplena de amo !
 Mi kredis
 Ke estis
 Vi, de mia koro, taŭga balzamo...
 Nur bela sono ! Sur la returnvojo
 Mi ploris
 Kaj ridis
 Vi, kruel', pri mia senfin' malĝojo.

C. V.

MEMORAĴOJ

« Atentu, diris al mi mia ĵusa kunparolanto, ĵus eniras timiga viro ! », kaj li fingremontis al mi ĵunan, gajmienan sinjoron, kiu ĵus eniris la salonon kaj premis multajn manojn. Mi formetis la okulvitrojn — al mi ili utilas nur por elpreksima vido — kaj ŝajnis al mi, ke efektive temas pri nia amiko C. V... « Jes, daŭrigis mia kunulo, pro tiu timinda viro, oni neniam povas esti trankvila ! Vi sidas, supoze, vi ripozetas en komforta apogseĝo ; vi fumas (aŭ ne fumas) bonan cigaron, kaj, jen, li alvenas. Tiam, nenia kvieteco plu ebla : li ĉiam puŝas vin «Antaŭen» kaj, vole ne vole, vi devas obei... »

Efektive, la amiko C. V. alproksimiĝis. Unue, kun rideto, li rakontis al ni pri kelkaj eĥoj el la grupa vivo de nia loka anaro ; post kiam li estis sufiĉe kaptinta la atenton, li iomete apartigis min kaj, traserĉante subvertan poŝon, li elirigis dikan paperaĵon, bone ordigitan, bele titolitan. Li klarigis al mi, ke li intencas verki kelkajn paĝojn pri la Esperanta movado en la urbo, li vidigis al mi la jam kolektitajn sciigojn pri la komenco de la grupo. «Bonan idcon» mi jesis : sed, apenaŭ mi estis kvazaŭ senatente tion dirinta, li ŝovis en mian manon paperfolion kun demandaro. Tuj kiam vidita, tuj kaptita ! Diabla viro ! Cetere, mi sen-

honte konfesas ke tia verkonto, neniel povas esti maldiskreta. Por la progreso de nia afero, neniam sindonema Esperantisto malakceptos tian taskon.

Bona ekzercado : sur la demandaro, mi rimarkis la preskaŭ tutan kolekton de la demandaj vortoj : kie, kiam, kiel, k. t. p. Kiam mi fariĝis Esperantisto ? O ! jam antaŭ longa tempo, kara amiko ! En la jaro 1905 a (februaro) — mi tiam estis ŝtata oficisto — mi loĝis en Arras. Kelkaj interesuloj ĵus kreis esperantistan grupon, kaj, inter ili, unu el miaj kolegoj. Mi ĉiam ŝatis la studon de alilandaj lingvoj : mi ĝis tiutempe neniam aŭdis pri la helpa lingvo, tamen la demando tuj interesis ankaŭ min kaj entuziasme mi aliĝis al la nova grupo. Ĉirkaŭ tridek lernantoj kuniĝis por aŭdi la kurson gvidatan de Sro Leŭtenanto Husson, jam malnova Esperantisto, ĉar li lernis la lingvon jam de du jaroj antaŭe, inter la anaro estis multaj fervoruloj, la progresoj estis rapidaj.

Kelkaj monatoj poste, ni havis la ĝojon ĉeesti la unuan Universalan Kongreson, en Boulogne. Ĉirkaŭ dudek anoj el la grupo tien iris. Ni veturis ope : la Prezidanto de nia grupo, S-ro Motte, kvankam jam maljuna, ne estis la malplej vigla. Alveninte en la «Internacian Urbon», ni tuj iris al la teatro, kie funkciis la Akceptejo. Tie jam kunestis grava anaro : nia Prezidanto demandis ĵunan, afablan deĵorantinon, ĉu estas tie alilingvanoj kaj tuj la fraŭlino diris : « Jen S-ro Avilof, profesoro en Tiflis »... Je nia granda miro, la du sinjoroj tuj komencis ekbabili, kiel malnovaj konatuloj. Dum la tuta tago (estis dimanĉe) ni uzis nian ĵunan sciencan ; vespere ni ĉeestis la oficialan malfermon kaj teatran prezentadon, kiuj ambaŭ entuziasmigis nin.

Pri tiuj okazintaĵoj, kiuj estas la historio mem de nia movado, mi ne volas ĉi-tie raporti : ĉiuj povas ja legi pri ili en nia literaturo. Cetere, mi mem ne havis longan libertempon kaj povis resti nur dum du tagoj — aliaj amikoj estis pli feliĉaj kaj povis ĝui la tutan feston. Ne necesas diri, ke nia vigleco estis ankoraŭ pligrandigita. Tuj de l'komenco de vintro la kursoj ekfunkciis. Instigata de amikoj en la urbo Lens, mi komencis tie propagandon. Kun la helpo de grava Lensa societo «Les anciens élèves des Ecoles de Lens» S-ro Advokato Michaux, la organizinto de la Unua Kongreso bonvolis prelegi kaj pli ol 500 personoj aŭskultis la brilan paroladon, post kiu 140 enskribiĝis por la kurso. Dufoje posemajne mi veturis en la najbaron urbon kaj havis la plezuron konstati la daŭran ĉeestadon de bonaj, fervoraj lernantoj. Malfeliĉe, dum la unuaj tagoj de marto, okazis tiu terura katastrofo en la minejo, kie pli ol 300 miniistoj pereis. Poste okazis striko kaj, la lastan fojon, kiam mi vizitis la kurson, soldatoj kaj ĝendarmoj estis sur ĉiuj stratoj. Ni jam atingis la okan lecionon de la lernolibro «L'Esperanto en 10 leçons» ; la malbona stato daŭris pli ol du monatoj kaj ni ne plu povis daŭrigi la taskon : tamen, je tiu momento, pli ol cent lernantoj ankoraŭ sekvis la kurson.

Intertempe, la kunvenoj en Arras estis ĉiam agrablaj kaj viglaj. Kiom da bonaj amikoj, oni renkontis tiel ! Dum vintro, la kunvenoj okazis en urba konstruaĵo ; somere, ni organizis interesajn ekskursojn. Kiel ne memori, inter ili, la promenadon al Luchaux ? Uzo de Esperanto estis deviga, nur du anoj rajtis paroli france por la klarigoj al la hotelestro... Ili klarigis ke ili gvidas areton de fremduloj, kiuj ne parolas france...

Ni multe laboris por Esperanto. Ĉar mi ne povis partopreni ekzamenon por akiro de «Atesto pri kapableco» organizata de S.F.P.E., la komitato de la asocio bonvolis permesi al mi provi la ateston antaŭ S-ro Cart, kiu, tiucele, kunvokis min en sia propra hejmo, ian vesperon de marto 1906. La adreso «Rue Soufflot» estis jam famkonata en la tuta

(1) Tiuj linoj estas verkita jam de kelklonga tempo : la leganto do ne miru se mi aludas la verkotan libreton de Sro Vernay, projekto nun efektivigita.

mondo : ne sen emocio mi tien iris post la vespermanĝo. Jus estis vespero de festa tago en la Latina Kvartalo, sub la fenestroj de la Profesoro, karnavala anaro pretiĝis, kiun ni povis ekvidi el la balkono de la 5-a etaĝo. Sed ni devis labori : S-ro Cart definis al mi la faroton taskon, tio estas du tradukoj. La parola ekzameno konsistis el duhora interparolo, despli interesa por mi : estis malfrue, kiam mi forlasis tiun agrablan kuneston, kaj la Profesoro bonvolis malavare certigi mian kapablecon. Pri ĝi, mi estis tre fiera, ĉar nur iom post pli ol unu jaro da studo, mi povis plenumi sufiĉe malfacilan provon. Ĉu miraklo ? Tute ne ! La helpa lingvo estas tiel facila ! Tamen, estas necese ĝin serioze studi : dum la vintra sezono, mi multe legis. En tiuj fruaj tagoj de Esperantismo, la legolibroj ne estis multaj sed ili estis bonegaj kaj mi legis ilin du-tri foje : "Fundamenta Krestomatio", "Esperantaj prozaĵoj", "la Fundo de l'mizero", "Franca Esperantisto" kaj la bonega "Revuo" alportis sufiĉan materialon. Tial, al la perfektigemuloj, mi ĉiam rekomendas multan legadon eĉ pri la samaj verkoj ; sed, hodiaŭ, la elekto estas pli facila, tiel multe la esperantaj gazetaraj kaj literaturaj pliriĝis.

Ankaŭ bona ekzercilo estis la korespondado. Se, en tiuj fruaj tempoj de la propagando, la literaturo ne estis tiel riĉenhava kiel nuntempe, ni havis almenaŭ alian avantaĝon : la kosto por letersendado ne estis tiel alta, kaj ni povis daŭre interŝangi korespondadon kun alilandaj samideanoj. Mi elektis ĉirkaŭ tridek korespondemuloj kaj, preskaŭ ĉiutage, mi ricevis ĉu leteron, ĉu poŝtkarton, inter kiuj kelkaj interesplenaĵoj.

En la jaro 1906-a, mi povis ĉeesti la Duan Universalan Esperanto Kongreson, en Genevo. Kun arrasaj amikoj, ni veturis kvarope al tiu bela kunveno. De tiam, mi ne plu vizitis kongreson : sed, mi dubas, ĉu multaj aliaj estis tiel bone organizataj kiel la Dua, el kiu ni kunportis neforgeseblajn memorojn. En tiamaj gazetoj, aŭ en Historio de la Movado, vi trovos raportojn pri tiu okazintaĵo, kaj eble ankaŭ eĥojn pri la entuziasmo dum tiu semajno, kiam pli ol 800 samideanoj, por la dua fojo, spertis la belecon de la helpa lingvo. Nia "Majstro", D-ro Zamenhof estis tie, kaj, certe, la tondraj aplaŭdoj, kiuj lin salutis je ĉiu apero, estis por li, la komenco de rekompenco ! La interna ideo, kiun li tiel bone difinis regis tiam la tutan anaron : ĉio farata, estis kvazaŭ familia arango.

P. BENOIT (*Daŭrigota*).

Orienteringslöpning, Sveda Nacia Sporto

La vastaj sovaĝaj regionoj en la maldense loĝata Svedujo estigis novan sportbranĉon, kiu en aliaj pli civilizitaj landoj apenaŭ povus prosperi. La sporto nomiĝas orientada kurado t.e.c. ĝiaj praktikantoj havas la taskon atingi en kiel eble plej mallonga tempo certan punkton en la tereno preterpasante kelkajn kontrolstaciojn. Ili ne rajtas koni la terenon, sed la celo estas, ke ili sole per helpo de landkarto kaj kompasu trovi la vojon tra la sovaĝa pejzaĝo. Ĉe noktaj konkuroj ili krome devas uzi poŝlampon kaj fajfilon. La ĉefajo ne estas la rapideco de kurado, sed la kapableco orienti sin. La finpunkton de la konkuro ili ekscias nur tuj antaŭ la starto. Laŭ la kvalito de la partoprenantoj la distanco varias inter kvin kaj dekkvin kilometroj. Ju malpli bone la tereno estas superrigardebla, despli ĝi taŭgas por orientadaj konkuroj. Naturaj obstakloj kiel riveroj ktp estas ŝatataj por malpli faciligi la taskon. Tia necivilizita arbura pejzaĝo estas facile trovebla en Svedujo kaj la sporto havas la

praktikan celon ekzerci la homojn en orientado, kio estas tre necesa okaze de piedmigradoj en multaj svedaj regionoj. Pro tio tiu sporto estis enkondukita de la sveda armeo je la komenco de ĉi tiu jarcento, sed depost dek jaroj la civila sportemularo tre interesigas pri ĝi kaj ĝi estas pli kaj pli praktikata. Orientada kurado postulas sufiĉajn kapablojn de la partoprenantoj, kaj spirite pro la orientado kaj korpe pro la streĉa irado, travadado de riveroj kaj eventualaj danĝeroj kiel sovaĝaj alkoj en aŭtuno aŭ erariro.

Kutime oni praktikas la sporton laŭ individua sistemo, tiel ke ĉiu partoprenanto sola startas kaj sola serĉas la vojon. (Kompreneble devas esti tempospaco inter la singulaj startoj). Sed la konkuroj povas ankaŭ esti aranĝataj tiel, ke malgrandaj grupoj konkuras. La orientada konkuro estas tre ŝatata sporto kaj ĝia praktikantaro ĉiam kreskas. Ĉe la lasta distrikta konkuro en Uppland estis pli ol 200 partoprenantoj kaj en konkuro aranĝata de Stockholm estis lastatempe ĉirkaŭ 700 konkurantoj. Plurfoje oni ankaŭ okazigis konkurojn inter Svedujo kaj Norvegujo, ĉe kiuj kutime tiu partio venkis, en kies lando la konkuro okazis. En la plej multaj svedaj distriktoj ekzistas ĉampionoj, sed tutsveda ĉampiono ankoraŭ ne estas destinita, ĉar la organizo de tutsveda konkuro pro necese de tute nekonata tereno estas malfacila, sed la koncernaj sportkluboj intencas en proksima tempo organizi ĉampionan konkuron por tuta Svedujo.

A. B.

EL AUSTRALIO

Sub la titolo "Al Joab Eljot la parolvico !" la ĝoja Esperanto-Papo de Aŭstralio publikas la jenon :

« Klarige : oni sciu, ke antaŭ nur nelonge fondiĝis A.E.A. (Aŭstralio Es. As.), kies unika celo — tutkore kunlabori por antaŭenpuŝi Oficialan Esperanton kiel la Mondlingvon.

« Kiam A.E.A. eksciis pri la alveno de S-ro Lanti al Aŭstralio, decidigis : ke oni proponu honoran anigon al S-ro Lanti ; kaj plie, ke li fariĝu Prezidanto por 5r E-Jr (1938) dum sia restado en Aŭstralio. La respondo de S-ro Lanti per afablaj vortoj estis, ke li ne povas akcepti pro jeno, ĉar li verkis la libreton "Por la Neŭtralismon !".

« *Kia sensenca, eĉ idiota, kialo por rifuzi !*

« Nun do mi ja povas pli bone kompreni, kial S-ro Lanti fariĝis sennaciulo, senhejmulo, senprincipulo, kaj devas vagadi tra la mondo kiel sencela mizerulo, al kiu forperdigis ĉiu starpunkto.

« Mi ree atentigu la kompatindan herezulon pri tiu mondfama devizo, "For la Absolutismo !".

« Nu, ne esti neŭtrala signifas fariĝi partia, kaj partieco estas la unua paŝo kondukanta ĝis la absolutismo.

« A.E.A. estas Por-Esperanta Asocio. »

Aux nouveaux Espérantistes

« Vous apprenez l'Espéranto, c'est bien ! Voulez-vous avoir un "Aperçu sur l'évolution du problème de la langue auxiliaire" ? Achetez donc le volume qui vient de paraître sous ce titre, en français, et qui est dû à la plume de M. C. Vernay. Vous aurez ainsi, en un raccourci saisissant, toute l'histoire de la langue auxiliaire depuis ses origines. (10 fr. franco, chez l'auteur, M. Vernay, 18, rue Albert-1^{er}, Dunkerque, Compte Ch. Postaux 403-50 Lille).

Voici l'analyse que donne de ce livre notre excellent confrère "Belga Esperantisto" dans son numéro de mars 1938 :

« Jen sendube unu el la plej bonaj, plej efikaj propagandaj eldonaĵoj kiuj nacilingve aperis pri Esperanto.

» En la libreto, grandformata 76-paĝa, ni trovas la kompletan evoluon de la ideo pri helplingvo internacia lerte redaktitan kaj bone prezentitan. La libreto ekde sia apero tiom bone impresis ke oni tuj uzis ĝin por efika propagando kaj eĉ por ĉerpi el ĝi regule dokumentajn gazetartikolojn.

» Tiu unua parto de la broŝuro, fakte la enkonduko, estas verkita de D-ro Degand, advokato kaj prezidanto de la Grupo de Dunkerque.

» La dua parto skizas la historion, la evoluon kaj la intensan vivon de la ticia grupo. Ankaŭ tiu parto estas tre utila, ĉar ĝi montras kiamaniere akiri viv- kaj laborplenan grupon.

» La broŝuro estas dokumenta por ĉiuj kaj instiga precipe por grupanoj. Diversaj belaj fotografiaĵoj pligrandigas ankoraŭ ĝian valoron. Inter tiuj portretoj ni precipe citu tiujn de Zamenhof, Dumont, la nestoro de la movado en Dunkerque, Deligny, konata Esperanto-profesoro, P. Benoît, prezidinto de la loka grupo, kaj plej simpatia samideano Archdeacon, granda batalanto por nia lingvo, k.t.p.

» HOSO. »

La "aria" raso - historia trompo

El la eks-austria gazeto "Gerechtigkeit" (organo de la Harand-movado) numero de la 10a de februaro, ni represas la suban artikolon. Ĝi certe interesos niajn legantojn pro la ĝeneralaj historiaj konsideraĵoj de la aŭtoro kiu prezentas facilmaniere la diversajn flankojn de problemo multe pridiskutata.

La Red.

Oni formis novan ideon kaj ĝin enmartelis en la konscion de la popolo. Por kia celo ? Por la celoj de la propagando ! Pro kia kaŭzo ? Ĉar oni ĝin bezonis en tiu formo ! Kaj 70 milionoj da homoj vivas nun sub la magia influo de tiu fetiĉo, kiu kreis arbitreco !

Kio do estas "Arjo" vere ?

Jam de jar-miloj for-mortinta popolo, kiu en pra-tempoj konkeris Iranon (Persujon) kaj vastajn partojn de l'Antaŭa Hindujo kaj for-puŝis la Dravidojn en la orientan parton de l'hinda duon-insulo. La Perso kaj la Hindi estas mikso-produktoj de tiu pra-aga migrado de la "Arjoj" al la sud-oriento.

Alia parto da Arjoj migris al la okcidento kaj sud-okcidento kaj ankaŭ ĝia sango disfluis en la maro da popoloj, kiujn ĝi subigis. La prahistoriaj Germanoj antaŭ la epoko de la migrado de l'popoloj, kiam iliaj mil gentoj sidis ankoraŭ de Rusujo, kaj la Helenoj, kiuj loĝis en Grekujo, estas miksitaj el Arjoj kaj pra-loĝantoj.

Sed la Slavoj kaj Romidoj havas laŭ-sange kun la Arjoj rekte nenion plu komunan ; ĉar jam en la tempo de Homer la Arjoj estis delonge malaperintaj. La migrado de la Slavoj okcidenten sin rulis tra la pra-tempaj loĝ-lokoj de la Arjoj, kiam tiuj ĉi, elmortinte de jam pli ol mil jaroj, estis asimilitaj kaj ensorbitaj de Persoj, Hinduoj kaj Germanoj. — Pri la Romidoj ni tuj parolos.

La migrado de la pra-ajaj Arjoj estis bon-faro. Ili estis kultur-produktantoj. Almenaŭ en Irano kaj Hindujo. En Hindujo sin konservis propra kulturo kaj propra lingvo. Ne tiel sukcesa estis la mikso de la Arjoj kun la Germanoj ! Kie do ekzistis germana kulturo antaŭ la tempoj de Kristo ?

Sed la Romidoj, unue Romanoj kaj Italoj, kaj eble 700 jarojn poste la Galoj (Francoj) kaj Iberoj (Hispano). Kio do estas kun ili

La Romanoj sin derivas laŭ-sange de Encas el Troja, kaj per tio ni venas al la dua granda kultur-sfero de l'Antikva Mondo, kiu havis sian pra-fonton ĉe la Sumeroj. Kaj la Sumeroj estis eble neniaj Semitoj, sed certe ne Arjoj. Poste venas la Helitoj kaj la semitaj Fenicianoj kaj inter ĉiuj nomitaj Troja kaj post ĝi Romo kaj sur la alia flanko de l'Meza Maro la afrika semita Kartago.

Kaj la Romanoj sin miksis kun la praloĝantaro de la itala duon-insulo kaj subigis la semitajn popolojn de Kartago kaj asimilis ilin.

Kaj poste renkontis la ne-arjaj Romanoj la duon-arjajn Grekojn kaj poste ankoraŭ la eble 10-procente ne-rekte arje kunmiksitajn Galojn kaj Iberojn kaj miksis de-nove sangon, lingvon kaj tradicion kun ĉiuj nomitaj.

Kaj tiuj ĉi unuigoj estis feliĉaj. La nobla romane-greka kulturo formiĝis kaj kun ĝi la romidaj popoloj. Kie estas tie ĉi arja sango kaj arja lero, konkerita per "arja" glavo kaj tranĉita per "arja" plugilo ? Kie, mi demandas, kie ?

Poste venis duon-arjaj Germanoj kaj — disbatis Romon. Sed la venkintoj estis ensorbitaj de la venkitoj kaj ili ĉiuj formortis : la Okcidentaj Gotoj kaj Orientaj Gotoj, la Longobardoj kaj la Vandaloj ! —

En tiu tempo la fajrero el Betlehem en Judeo dum kvar jar-centoj fariĝis brulo, kaj en ĝiaj flamoj fandis pra-aga juda saĝo la restaĵojn de la detruita romana kulturo kun la germana vivi-volo je nova formaĵo, je dua Romo, je kristane-okcidenta kulturo.

Kaj la rolo de la Germanoj ? — Ili estis la voj-preparantoj de la romane-jude-kristana kulturo. Kaj sen Jezuo ili estus nur detruantoj.

Tio estas la vero !

* *

Kaj hodiaŭ ? Kia sang-makulita atavismo ! La tomboj sin malfarmas, la fantomoj eliras kaj tiras la vivantojn al si en la profundon.

Movado ekregas en Germanujo, tiu mikso-polo de rasoj, proklamas unu popolon — la plej miksitajn en tuta Eŭropo — kiel pur-rasajn "Arjojn". Kiel elektitan de Dio kaj rajtigitan, nove formi la sorton de Eŭropo, kaj nome laŭ kredo, moralo, spirita tendenco kaj ankaŭ korpe en rekta linio al la jaro 400, al Alarikh, la reĝo de Gotoj, kaj Gezarih, la reĝo de — Vandaloj. La unu kaj duono da jar-miloj, de tiu tempo ĝis hodiaŭ, estas nur eraro, falsa vojo de la historio — proklamas tiu movado.

* *

La sango de la pra-ĝaj Arĵoj de-longe ne plu ekzistas, eĉ la sono de ilia nomo estis preskaŭ for-blovita. Sed la lingvoj de preskaŭ tuta Eŭropo, Hindujo kaj Antaŭa Azio similas unu al la alia en la radikoj. Kaj tiu ĉi lingva parenceco, ĝi atestas ankoraŭ hodiaŭ pri tiuj legendaj migradoj de la de-longe for-mortintaj Arĵoj. "Hinde-germana lingva komuneco", tiel oni ĝin nomas kaj ĝi ekzistas efektive.

Sed tiu ĉi lingva parenceco ne estis kapabla servi al la celoj de l'naci-socialismo. Kaj pro tiu kaŭzo ĝi prenis la lingvan ideon, kiu estis dorno en ĝia okulo kaj falsis ĝin je rezervujo da sango kaj da raso. Kaj donis al la libere elpensita, en efektiveco tute ne ekzistanta ideo la nomon — "arjismo".

Kaj tiu ĉi arbitra falsajo, ĝi estas la fundamento de l'naci-socialista doktrino.

G. GUNTHER.

JUDO AŬ GREKO

Esperanto estas nenies propraĵo! Ĝi povas esti uzata de ĉiu ajn por kiu ajn celo. Zamenhof donis al la homaro instrumenton, per kiu la lingvaj muroj estis disbatotaj. Li volis krei interkomprenilon praktikan. Sed unue kaj laste la aŭtoro de Esperanto estis idealisto. Li revis pri venonta tago, kiam la diversaj nacioj forgesis la lingvan diversecon kaj pere de Esperanto konatiĝis unu kun la alia tiom, ke ili komprenas, ke la homaro konsistas el homoj. Iliaj vizaĝoj haŭtkoloroj, manieroj, moroj, kredoj kaj vivvidpunktoj estas malsimilaj, sed ĉiu havas rajtojn kiel homo. En ĉies brustoj batas koro. Mi kredas, se mi bone komprenis la enhavon de la paroladoj de Zamenhof, ke li antaŭ ĉio pensis pri la homamo. Ĝi estis por li de la frua infaneco ĝis la lasta vivminuto sankta gvid-principo. Sur la homamo li konstruis sian mondlingvon.

Esperanto povas esti uzata por kiu ajn celo. Tion Zamenhof mem esprimis. Sed mi kredas, ke, dirante tion, li ne deziris, ke la lingvo estu uzata tiamaniere ke ĝi mortigas la fundamentan principon de homa kunvivado.

Judo aŭ greko, protestanto aŭ katoliko, mahometano aŭ budisto, negro aŭ amerikano, ĉio tio estis flankaj aferoj por Zamenhof. Li parolis al kaj volis agi inter homoj. Ni neniam forgesu tion.

Mi scias, ke troviĝas multaj esperantistoj, kiuj skuas la kapon kiam la idealisma flanko de Esperanto estas diskutata. Ili skuu kiom ajn, tio ne povas forigi la fakton, ke la kerno de la ideo de la lingvo estas homamo. Tio ne malgrandigas la praktikan valoron de Esperanto.

Oni ekmalĝojas legante en la gazetoj ke troviĝas Esperantistoj, kiuj estas tiel nacie aŭ partie blindigitaj, ke ili ne povas permesi ekz. al judaj samideanoj, kiuj dum tuta vivo laboris por Esperanto, aparteni al la landa asocio. Ili certe agas kontraŭ la ideo de Esperanto.

Zamenhof estis judo kiel multaj aliaj herooj de la kulturhistorio. Sed en li ne estis malfido aŭ malsincereco. Lia vivverko estis tia, ke ĝi donos benon kaj feliĉon al la homoj, se la homoj nur komprenos decifri lian plej internan penson.

Ni respektu unu la alian. Carlatanoj kaj fihomoj estu punataj, eĉ se ili estus konsiderataj la plej altrangaj. Sed honestaj homoj, kiuj faras siajn deojn laŭpove, estu laŭdataj kaj honorataj, ili estu blankaj aŭ nigraj, longaj aŭ dikaj.

Ne gravas, se mi apartenas al tiu aŭ tiu ĉi raso, se mi havas kurban

nazon, ruĝan haŭtkoloron aŭ ne. La eksterajoj varias, kaj la vario dependas de multaj kialoj. Grave estas, kia homo mi kaj vi estas rilate al pensoj, vortoj kaj agoj.

Einar DAHL.

(El Svenska Esperanto-Tidningen).

Fédération Espérantiste du Nord de la France

Réunion du Comité Fédéral, à Saint-Omer, le 10 avril 1938

La réunion s'est tenue à la Chambre de Commerce, à 10 h. 30, sous la présidence de M. Albéric Humez. De nombreux délégués et membres de la fédération y assistaient.

Ont demandé d'excuser leur absence : J. Centnersver, secrétaire-général, M. Alglave, P. Hulín, M. Buronfosse.

Le président exprime à M. Deligny, président d'honneur, la reconnaissance de la Fédération pour le don magnifique qu'il a fait à la Bibliothèque municipale de St-Omer de la collection d'ouvrages et documents espérantistes lui appartenant, enrichie de nombreuses pièces provenant de M^e Alfred Michaux. Il se réjouit de voir cette précieuse collection rester sur le territoire de la fédération, à la disposition de tous les espérantistes.

A la demande de M. Deligny, la fédération accorde une somme de cent francs, pour participation aux frais d'installation de cette bibliothèque.

Un appel est fait aux groupes qui n'ont pas encore acquitté leurs cotisations de 1938. Au 31 mars, 13 groupes avaient envoyé au trésorier 496 cotisations. Il est souhaitable que, pour l'Assemblée générale de Lens, ce chiffre soit considérablement augmenté et atteigne au moins celui de fin 1937, soit 24 groupes et 733 membres.

Dans une note adressée par le secrétaire-général, celui-ci insiste sur le même point. M. Centnersver ajoute quelques mots : 1^o) au sujet de la bibliothèque fédérale et déplore que le retour des livres prêtés soit difficile ; 2^o) au sujet des groupes nouvellement créés (Lillers, Aire-sur-la-Lys, Hazebrouck, Carvin, Loos et Hénin-Liétard) dont les dirigeants sont invités à se mettre sans délai en rapport avec lui.

D'une autre note du trésorier fédéral, il résulte que l'avoir de la Fédération, à ce jour, est de 1.200 frs. Un compte-rendu détaillé sera présenté à l'Assemblée générale du 8 mai.

M. P. Brunet, secrétaire pour les isolés, met le comité au courant de son action dans la région, toujours active et efficace.

M. Maurice Nogé, secrétaire pour la radio, rend compte du travail considérable qu'il fournit en écoutant toutes les émissions espérantistes et écrivant aux stations. Il se plaint de ne pas recevoir des délégués des groupes le petit rapport mensuel déjà maintes fois demandé.

Les émissions de Radio P.T.T.-Nord, qui ont lieu le samedi après-midi, sont moins écoutées que quand elles avaient lieu le dimanche matin ; il est recommandé à tous d'écrire à la station pour lui demander le retour à l'ancien état de choses, infiniment plus commode et plus efficace.

M. Ed. Houzé, secrétaire pour la presse, dit à nouveau qu'il est prêt

à envoyer gratuitement des articles tout faits, à tous ceux qui voudront se charger de les faire passer dans les journaux de leur localité.

M. A. Dumarquez, secrétaire pour les instituteurs, a adressé à de nombreux collègues espérantistes une très bonne circulaire qui n'a pas éveillé l'écho qu'il en attendait. Il est déplorable de constater que, dans tous les domaines d'activité de la fédération, quelques dévoués (toujours les mêmes) se donnent un mal considérable pour le bien de tous — et qu'ils se heurtent tous à l'inertie de ceux dont le devoir serait de les aider.

Foire Commerciale de Lille. — Nous avons dû renoncer cette année à organiser un stand à la foire de Lille. Il ne nous est pas possible en effet de payer, comme l'an dernier, plus de six cents frs pour cette installation et, d'autre part, le concours qui nous avait été promis pour l'obtention d'un emplacement gratuit nous a fait malheureusement défaut.

Assemblée générale du 8 mai, à Lens. — L'ordre du jour de cette assemblée est ainsi fixé :

1. Allocution du président ;
2. Rapport du secrétaire général ;
3. Rapport du trésorier ;
4. Rapports des secrétaires spécialisés ;
5. Election du président et des vice-présidents ;
6. Lieu et date du congrès de 1939 ;
7. Questions diverses.

M. Humez rappelle que — ainsi qu'il l'a fait connaître maintes fois et notamment par sa lettre circulaire du 16 mars, — il ne sera plus candidat à la présidence. Si aucun membre de la fédération ne pose sa candidature, le siège de président sera déclaré vacant.

Il sera proposé à l'assemblée générale de ratifier, pour le congrès fédéral de l'an prochain, le choix de la ville de Fresnes-sur-l'Escaut et la date du 14 mai 1939 (quinze jours avant la Pentecôte).

M. Ed. Houzé demande que les rapports du secrétaire général et du trésorier à l'assemblée générale soient envoyés aux groupes avant cette assemblée. Si un numéro de *N/E*, paraît avant le congrès, ces rapports pourront y être insérés ; sinon, le secrétaire général envisagera leur polycopie et leur envoi aux groupes au plus tard une semaine avant l'assemblée générale.

Nordfranca Esperantisto. — Afin d'aider notre ami Cl. Vernay, qui assure, avec le dévouement que l'on sait, la publication de notre bulletin, le comité de la fédération lui accorde pour la deuxième fois, une subvention exceptionnelle de trois cents francs.

La séance est levée à 11 h. 30.

A. H.

NI DAŬRIGU I...

Karaj geamikoj, mi salutas vin ! Mi ne scias, ĉu miaj antaŭaj artikoloj plaĉis al vi, ĉar neniu el vi skribis pri ili. Tamen mi estus kontenta scii tion... Ili estis iom malĝojaj, kaj tial ĉi tiufoje mi provos vin ridetigi per la sekvanta rakonto :

MALFACILA KAZO

Patro Dikfaden, blankhara kaj maldika maljunuleto, sidigis en la vestiblo de la kliniko, sur la benko apogita kontraŭ la muro.

Dikfaden venis por konsulti pri la okuloj. De 52 jaroj kiam li estis tajloro li estis havinta tempon por ilin eluzi, ĉu ne ? Sed nur de kelkaj semajnoj lia filo kaj lia bofilino, kiuj loĝis kun li, rimarkis en lia laboraĵo bedaŭrindajn erarojn. Tamen li ĉiam havas la saman lokon, la plej bonan, sidanta kun la kruroj krucigitaj, kiel bona tajloro, la lumon de maldekstre, kaj manoj ne tremantaj, kvankam ili estas eksterordinare tuberaĵaj kaj zigzage trakuritaj de dikegaj vejnoj.

Kaj jen, plurfoje, Dikfaden-filino estis trovinta, en la patra laboraĵo, poŝojn tiel strange kudritajn, ke la mano ne povis enpenetri, kaj butonojn tiel lokitajn, ke la butonruoj estis nealireblaj.

Timeme, ĉar la patro estas kolerema, la filo estis dirinta, ke, eble, okulvitroj... Per senkuraĝiga tono, la maljunulo estis respondiinta, ke li ne bezonas ilin, tial ke ankoraŭ bone vidas la kokon sur la preĝeja turo, kaj eĉ la horon sub la koko.

Necesis, por alarmi lin pri sia vidkapablo, ke venis iu gravulo, kiu akre riproĉis al li pro vesto difektita...

Tiam la junaj Dikfaden sukcesis decidigi lin envagonigi por iri al la urbo kaj aĉeti okulvitrojn en la kliniko de S-ro Longvid, okulkuracisto. Dikfaden ne estis sen maltrankvileco kiam la pordo malfermiĝis kaj S-ro Longvid faris al li mansignon. Tiu kabineto, kun strangaj aparatoj...

— Eniru, eniru, mia brava ! Vi nomiĝas ?

— Dikfaden, sinjoro, tajloro en Valmonto.

— Bone. Sidigu tie.

Tie estis tabureto, sur kiu li sidis, la dorso turnita al la fenestro, ne lasante la ĉapelon, nek la bastonon.

— Nu, kio ? diris S-ro Longvid. Vi ne bone vidas ?

— koncerne tion, mi ne povas plendi. Ekzemple, mi bone vidas vin, kun via nazo kaj buŝo, kiel mi vidas la horon kaj la kokon de la sonorigejo, je cent metroj de mi...

— Tiel... kaj de proksime ?

— De proksime ? Nu, eble ne kiel antaŭe, certe. Sed tamen mi faras mian laboron same kiam mi estis juna. Kelkfoje mi stebas apude, sed tio estas malofte.

— Bone. Eksidu tie, la dorso al la lumo. Metu for vian ĉapelon kaj vian bastonon. La doktoro sidigis sur lian nazon muntaĵon de okulvitroj kun du moveblaj vitroj, kaj montris al li per la fingro afiŝon kovritan de signoj kaj desegnaĵoj.

— Fiksu atente la okulojn al la cirklo malsupre, diris la doktoro. Kion vi vidas ?

— Sajnas, kvazaŭ estus radaradioj, respondis Dikfaden.

— Kaj de kia koloro ? Griza ? Nigra ?

— Jes, kvazaŭ nigra-griza.

— Kaj supre, tute supre, kion vidas ?

Kaj li montris la unuan linion de literoj : M R T V, k.t.p., iom malgrandaj, kiujn persono normalvidkapabla povas facile distingi je 5 metroj de ĝi.

— Ej ! diris Dikfaden rigardante atente. Mi vidas punktojn kaj liniojn. Sed mi ne povas diri, kio ĝi estas.

— Kaj sube ? la suba linio ?

S-ro Longvid, ĉe la tabulo, montris alian serion de pli grandaj literoj D L V A T B, k.t.p.

— Certe ĝi estas pli nigra, respondis Dikfaden. Sed por diri, kio ĝi estus...

— Bone. Kaj pli sube, kie estas mia fingro ?

— Kie estas via fingro ?

Tie estis skribsignoj ankoraŭ pli grandaj R C Y H O, k.t.p.

— Jes, kie estas mia fingro...

— Nu, mia bona sinjoro, mi ankoraŭ vidas liniojn, kaj punktojn, kaj ia rondo, sed estas ĉio.

— Diable ! murmuris Longvid. Tio estas pli serioza ol tio, kion mi pensis, kaj li ŝanĝis la moveblajn vitrojn.

— Necesos dikaj vitroj al vi !

— Ĉu ili estas pli multekostaj, demandis Dikfaden, levante la kapon.

